Okazis malfrue en aŭgusto, inter tagmezo kaj la sesa sonorado, okcidente de Trinidad, kiam ni povis sur la senventa flanko unue ekvidi ĉe la horizonto maston de pirata skuno. Unue ni vidis nur jardojn, poste vaĉkorbon, kaj antaŭespere jam la tutan ŝipon eĉ kun nigra flago sur la poupo. Ni ĉiuj atendis tion, ni sciis, ke ili sekvas nin jam el Liverpool. Pli surprizis nin eble, ke ili montriĝis nur tiel malfrue. Ni sciis, kiel bonvenigi ilin. Sur la ferdeko ni havis dekduon da tute novaj bombkanonoj, per kiaj ancorau ne estas ekipitaj eĉ ŝipoj de la reĝino, ni havis la plej bonajn musketojn el parizaj majstraj metiejoj, kiajn la soldataro de la franca reĝo havigos al si eble nur post kelkaj jaroj, kaj ĉiu el ili kostis pli ol paro da pursangaj usabaj virĉevaloj. Kaj sub la pruo estis amasego da pulvo, importita rekte el Italio, kie, tion ĉiu scias, oni produktas la plej bonan akvorezistan pulvon en la produktejo de Maestro Luigi. Kaj ancorau pli, ni proksimiĝis al tradoj. Estas konate, ke ĉiloke, kiam subite la maro trankviliĝas kiel oleo kaj ŝipoj haltas sub la brulanta suno, kiu kapablas konfuzi eĉ la plej viglajn sensojn, ke ĉiloke ĉio dependas de la ŝipanaro, kiu iam devas uzi eĉ remilojn kiel ĉe antikvaj galeroj. Miaj homoj estis decidoplenaj por ĉio. La viroj sur mia navigilo ja estis anoj de la plej bonaj Liverpoolaj familioj, elito de junaj viroj, ĝentilhomoj. Sole la stiletto apartenis al la marista gildo. Ni kunprenis lin, ĉar li estis rutina pri kompasoj kaj situoj de astroj, do li kapablis determini la direkton eĉ blinde. Mi forgesis jam multon de post mia lasta marvojaĝo. Miaj amikoj - ĉar sur la ŝipo ni ĉiuj estis amikoj - scias, kial ili veturas al la ekvatraj insuloj. Ili volas batali por sia idealo. Kontraŭe la piratoj navigadas nur por sia profito. Dum tutaj tagoj ili drinkaĉas rumon

OWOJA ARBE
1901 01107

kaj se ili haltas sur la ekvatoro, baldaŭ ili kaptas al si reciproke la gorgojn, pli frue ol ili havas tempon ekpreni la remilojn. Mi konas ilin. Mi konas la viraron de la kapitano Flint. Mi mem iam navigis kun li.

KIEL MI FARIĜIS PIRATO

Mia patro, Dio ĉiopova donu al li leĝeran ripozadon, havis malgrandan havenan gastejon apud malnova forlasita rodo en la distrikto Castle sude de Liverpool. Iu mortanta maristo, kiun mi priflegis kiel malgranda knabo, donis al mi skizon de mapo, sur kiu estis signita insulo, la plej riĉa kaj la plej bela en la tuta mondo - kiel tiu bona viro al mi diris sur sia mortlito. Li ĵurpetis min, ke mi forveturu tien sola, se mi iam en la vivo volas esti feliĉa kaj riĉa, ke mi forveturu tien kaj neniam venu reen. Tiam mi ne konsideris serioze la deliradon de la mortanto kaj lian skizon mi ĵetis sur fundon de mia vestkesto en la ĉambreto, kie mi loĝis kun miaj gefratoj, en la subtegmento de nia envetureja gastejo. Sed kiam en mia dekoka jaro perfidis min Mary, ĉar ŝi edziniĝis al la granda Jim, reveninta kiel ĉefserĝento el la milito kontraŭ la francoj, mi rememoris pri la insulo de la maljuna maristo, kiu estas malproksime kaj kie oni povas denove fariĝi feliĉa. Mi varbigis min por la unua ŝipo, kiu traveturis nian golfon, mi fuĝis el la hejmo kaj navigis multajn mejlojn sur la maro per la ŝipo, kiu okupiĝis pri pirata metio, ĝis je unu tago ni preteris mian serĉatan insulon. Ĝi estis eta insuleto en Okcidenta Hindujo, unuavide neniel okulfrapa. Tiam nokte mi saltis de sur la ferdeko kaj naĝis al ĝi. Tie mi surbordiĝis inter otarioj), strangaj bojantaj bestoj, kiuj terurigis min. Sed baldaŭ mi seniĝis de ĉiuj teruraĵoj. Loĝantoj de unusola vilaĝo sur la insulo gastame akceptis min, kvazaŭ mi estus ia dio. Kaj efektive, kiel mi eksciis, ilia religio atendis verdan dion, kiu venos el marondoj.

MI FARIĜAS ĈEFPASTRO

Oni fianĉigis min kun sia ĉarma reĝino, kiu loĝis en la unusola masonita domo de la vilaĝo. Mi fariĝis ilia reganto kaj ĉefpastro, kio ne estis malfacila por mi, ĉar ĉiuj homoj en tiu vilaĝo estis feliĉaj kaj kontentaj, ili ne devis multe labori, ĉar al ili disponigis ĉion la afabla naturo mem, ili ne devis vestadi sin, ĉar la klimato estis daŭre agrabla kaj ili neniam malpacis pro io, ĉar pro konstanta abundo ne ekzistis malboneco en iliaj koroj. Kaj ankoraŭ pli, malantaŭ la vilaĝo estis ora monteto, kie oni minis puran oron por ilaro de tiuj beatuloj. Ĉar oro estis la unusola metalo, kiun tiuj homoj konis. Ĉio sur tiu insulo estis el oro: ilaroj eĉ etaĝeroj, potoj eĉ kaldronoj, kuleroj eĉ lancoj, kiujn ili uzadis nur kiel ritajn instrumentojn, evidente kiel memoraĵon pri iliaj antaŭuloj, kiuj albor-diĝis iam sur la insulo. Feliĉa mi vivis tie.

KIAM ONI ESTAS FELIĈA?

Sed mi ne sciis aprezi mian feliĉon Baldaŭ mi komencis nostalgii, sola feliĉo ne sufiĉis al mi, mi volis fanfaroni per ĝi al miaj amikoj. Homo kvazaŭ bezonus por sia vivo spektantojn, kiuj povus envii al li. Homo kvazaŭ ne povus esti feliĉa sen malfeliĉo de aliuloj, tiel ŝajnis al mi. Kaj miaj insulanoj ne sciis envii. Ili pretigis al mi grandan fluson kaj liberlasis min iri, kiel ili opiniis, en la Cielon.

Ankaŭ ilia reĝino ne malesperis, kvankam mi pensis, ke ŝi amas min. Tiuj homoj ne sentis doloron pro io ajn, ĉar ili neniam suspektis la aliajn pro io. Kelkfoje mi ekpensis, ĉu tiu insulo ne estis la mita Utopio, pri kiu mi ofte audis.

MIA RESTADO EN LA ĈIELO

Almenaŭ tiel ŝajnis al mi, kiam mi revenis Liverpoolon. Kvazaŭ mi efektive estus en ĉielo. La oro, kiun mi alportis el la mita insulo, ĉie malfermis al mi la pordojn, alkondukis min en la plej altan societon kaj varbis por mi la plej bonajn kaj la plej brilajn amikojn. Sed ekzistis pli multe da similaj homoj. Kaj tiam ĉiu vidis: li revenis el malproksimaj maroj. Se li ne estis pirato, jen signo, ke li malkovris trezoron, aŭ novan teron. Persekutis min tuta amaso da aventuremaj nenionfarantoj. Ili traserĉadis miajn ĉambrojn, kiam mi ne catis hejme, koruptadis miajn servistojn kaj sendadis al mi la plej belajn hetajrojn por ellogi de mi la sekreton. Fine min renkontis la kapitano Flint, de kies ŝipo mi estis fuĝinta. Tiam estis ĉio evidenta. Li venis ĉe min kaj proponis al mi parton, se mi kondukos lin al mia trovejo. Mi volis malakceli la eventojn. Mi sciis, ke mi ne povas ŝanĝi multon. La kapitano bone memoris, sur kiu latitudo mi malaperis. Eĉ se mi diros al li nenion, li veturos tien je propra risko kaj el-murdos miajn bonfarintojn. Mi promesis al li decidiĝi dum unu semajno.

MI PAROLAS KUN LA REĜINO

Je la dua tago mi tuj forveturis Londonon. Samvespere mi akceptis la reĝino. Ŝi jam audis pri mia riĉaĵo, ŝi diris ridetante. Memkompreneble ŝi volontas plenumi mian deziron kaj protekti mian insulon per sia ŝiparo kontraŭ la kapitano Flint, se mi indikos al ŝi la pozicion de la insulo, kie ŝi nomos min guberniestro kun alta salajro kaj mi estos avancigita en kavaliran rangon. La riĉaĵoj de la insulo eĉ ĝiaj loĝantoj apartenas memkompreneble al la krono. Tiom diris la reĝino. Sed mi konas la soldataracion, kiu servas en kolonioj de Ŝia Regina Moŝto. Kia estas la diferenco inter ĝi kaj la kapitano Flint? La plej bonaj piratoj estas de-temp-al-tempo akceptataj en rangon de nobelaro, tia estas la kutimo, direktata per oro. Mi hastis Liverpoolon.

SOCIETO POR SAVI LA INSULON

Ĉi tie mi fondis kun miaj amikoj, sindonaj al pli altaj moralaj principoj, nobelidoj, kiuj plejparte ne konsentis kun dura agado de siaj patroj, novan societon. Por tuta mono, kiun ni havis, ni aĉetis ekipaĵon kaj armilaron, okupis la ŝipon, kiun mi konstruigis jam antaŭ tempo, kaj sekrete ni eknavigis el la haveno. Nia celo estis klara: ni savos la lastan angulon de la mondo, kie homoj sin sentas ankoraŭ feliĉaj, ni helpos al ili defendi ilian Utopion, ni montros nian homan dignon. Tia aventuro indas ĝentilhomojn. Rapide ni navigis for. Sed la kapitano Flint ne maldiligentis. Kaj hodiaŭ inter la tagmezo kaj la sesa sonorado, okcidente de Trinidad, ni povis sur la senventa flanko ĉe la horizonto unue ekvidi la maston de lia skuno. Mi havis ankoraŭ unu surprizaĵon. En la subferdeko estis lokitaj sakoj plenaj de luidoroj, gineoj, cekinoj, muadoroj, denaroj kaj taleroj, kiujn mi volis elŝutigi inter la maristaron, kiam ilia ŝipo alproksimiĝos. Mi scias, ke tia pirato oferas eĉ la plej fidelan amikon pro unu luidoro. Mi jam imagis, kiel ili luktaĉos inter si pro havaĵo, kiu jam nenien valoras por ni.

SED INTERVENIS LA TRIA SKUNO

La duan tagon, baldaŭ post la mateno, ĝi preterveturis nin kaj salutis per pafo el ambaŭ malgrandaj kanoj. Ĝi estis militskuno de Ŝia Reĝina Moŝto. Jam ĝi atendis nin en akvoj, proksimaj al mia insulo. Ĝi alhokis sin ĉe la ŝipo de la kapitano Flint kaj komenciĝis kruela masakro. La piratoj kaj la soldatoj unu al la alia disbatadis la kapon pro predo, al kiu ni estis gviditaj ilin. Feliĉokaze per tio ili retenigis ĝis la vespero. Mia observisto en la vaĉkorbo svenis. Li estis filo de Lordo Macpherson kaj neniam en sia vivo li pensis, ke homoj povas esti tiel kruelaj reciproke al si, li forgesis, ke lia patro mem iam komandis la skunojn de Ŝia Reĝina Moŝto.

NI SAVAS LA INSULON

Matene la duan tagon ni albordiĝis ĉe mia insulo. Oni vidis nek la piratojn nek la registarajn. Do ni havis kelkajn horojn da tempo. La vilaĝanoj bonvenigis mia kun entuziasmo, la reĝino ekploris. Ili volis aranĝi grandan feston, ĉar ili opiniis, ke mi revenas kiel potenco dio kun tuta akompanantaro de sanktuloj. Kaj eble ili preskau pravis. Ĉiuj miaj kunuloj estis trapenetritaj de nobla penso: savi ilin. Rapide mi rakontis al ili pri la danĝero. Pri tio, ke post kelkaj horoj alnavigos malamikoj, kiuj volos prirabi kaj eble eĉ mortigi ilin. Ili ne komprenis min. Ili ne sciis, kio estas malamiko. Kaj penso, ke homo povas mortigi homon kvazaŭ li estus besto, ŝajnis al ili ridinda. Ili ne komprenis min kaj anstataŭe preparis por ni brilan regalon, dum

kiu dancis je nia honoro la plej belaj knabinoj kaj la plej belaj knaboj el la komunumo. Jam ni kombinis, kiun por kiu tasko uzi en la defendo. Sed ili ne estis konvinkeblaj. Miaj amikoj malpacience rigardadis al la horizonto, ĉu ne aperos baldaŭ la skunoj de niaj persekutantoj, malpacience ni klopodis interrompi la regalon. Sed ili estis fortaj, kiam ajn ni volis defendi nin, ili sidigis nin en orajn brakseĝojn kvazaŭ infanojn. Ili kiel koskonaj batalantoj, mi pensis. Sed kiel ni devigos nin al tio? La dancado baldaŭ ekposedis la tutan komunumon. Tion mi konas, ili pasigas sian vivon per nobla konkurado, per ludoj kaj danco. Nun oni dancos ĝis senfortiĝo. Miaj amikoj estis malfeliĉaj. Ĉu ni ne sukcesos savi tiun ĉi popolon? Iliaj knabinoj estas tiom belaj kaj ilia vino tiom ebrietiga, ĉu ankau ni forgesos la taskon, kiun ni starigis al ni? Tiam al ni ĉiuj konsilis la ŝipano Israel Handy, kiu unusola estris la radon kaj tial akompanis nin. En la subferdeko estas multaj feraj globoj, garnitaj per ĝenoj, per kiuj oni povas kateni homon. Ni alligos la ferajn globojn sur iliaj kruroj kaj tiel ni povos pli facile regi ilin. Kiam ili falis pro senfortiĝo post la dancado kaj tuj ekdormis, ni komencis la laboron. Ni vestis al ili kirasojn kontraŭ musketaj kugloj, surkapigis al ili kaskojn kaj sur iliajn krurojn donis multfuntajn pezaĵojn.

MI MURDAS

La virinoj volis nin reteni. Ili ne komprenis, kion ni volas fari al iliaj viroj. Handy denove konsilis al ni: la virinojn ni fermos en la domoj. Se iu eliros, ni pafos ĝin. Mi klopodis klarigi tion al la reĝino. Sed ŝi ne komprenis min, ŝi volis eki kriadon, ŝi volis veti la virojn, kiujn ni armis dum la dormo. Mi devis stopi ŝian buŝon, sed ŝi defendis sin tutforte, ŝi ne volis esti prudenta, mi sciis, ke ŝiaj ekkrioj vekus la insulon, malebligus ĝian defendon kaj ŝin viktimizus al la piratoj. Mi volis ŝin savi, mi ekpemis ŝian buŝon, ŝian gorgon kaj sufokis ŝin.

Intertempe la indiĝenoj vekigis. Nenion ili atentis nian klarigadon, ili malatentis la musketojn, per kiuj mi volis instrui al ili pafadon. Ili deŝiris de si la ŝirmajn kontraŭpafajn kirasojn kaj facile - pro sia ega forto - fortordis niajn pezaĵojn, kiuj, kiel Handy malkretigis al mi, estis sur nia ŝipo por kargo de sklavoj. Ĝi estis fariĝonta sklavista ŝipo. La indiĝenoj ekatakegis nin. Unufoje mi vidis ilin furiozaj. Ili eksiegis nin en la unusola masonita domo. Nenion ili permesis ekspliki kaj kiam mi elpaŝis antaŭ ilin, ili ĵetis kontraŭ min sian unusolan oran lancon. Ĝi skrapetis min sur la ŝultro. Kaj poste ili komencis ĵetadi ŝtonojn, alportis siajn tranĉilojn kaj pretigadis antaŭ ni novajn kaj novajn lancojn. Ili ekatakis kaj ni devis pafadi kontraŭ ilin. Ni havis sufiĉe da musketoj kaj ankau da pulvo. Miaj ĝentilhomoj estis eminentaj pafantoj. Casado estis inter iliaj ŝatataj distroj. Ni pafadis eĉ kontraŭ virinojn, ĉar ili plej endanĝerigadis

nin per brulantaj branĉoj, kiujn ili jetadis sur la tegmenton. Jam ŝajnis, ke ni forbrulos, ĉu ke iu tia branĉo eksplodigos barelon da pulvo kaj jetos nin ĉiujn en aeron. Ni plifortigis la pafadon. Kaj vento disportis la fajron tra la tuta vilaĝo.

KIU NIN FINE SAVIS

Estis la kapitano Flint, la unuokululo, eterne kun papago sur sia ŝultro, kiu kriis fivortojn tra la tuta insulo. Ankaŭ liaj maristoj sekris surprizite. Ili sukcesis dronigi la registaran galeron kaj volis mem okupi la insulon. Kaj ni antaŭvenis ilin. Ili vidis nian laboron. La vilaĝo brulis, la indiĝenoj ĝemis sur la tero. La piratoj akceptis nin inter sin.

INSTRUO

Depost tiu tempo, senkompatate mi ŝipveturadas tra la maroj. Mi akceptis la nomon Skeletulo kaj ĉiuj ŝipoj turniĝas al havenoj, kiam ili nur ekvidas mian flagon. Angla reĝo, kiu surtroniĝis post la reĝino, eĉ hispana-reganto jam dufoje sinsekve proponis al mi tutan eskadronon, por gvidi ĝin kontraŭ Hispanion aŭ kontraŭ Anglion. Sed mi ŝipveturadas memstare tra la maroj kun miaj ĝentilhomoj kaj praktikas mian metion kvezau ian malbenon, ĝis mi savos min, ĝis iu diros al mi, kie mi faris la eraron.

KIU DIROS TION AL MI?

(Laŭ malnova teksto, malkovrita en sigelita botelo, elmergita de kapitano Stevenson sude de Corso Castello, okcidente de Tortuga, el la angla lingvo tradukita kaj notita la 8-an de decembro 19^{oo}.)

El la ĉeĥa tradukis Adolf Staňura

▲ Josef N e s v a d b a (1926) - konata ĉeĥa verkisto, aŭtoro de scienc-fikciaj prozaĵoj. Inter ili famiĝis kolekto de rakontoj La Morto de Tarzano, el kiu estas ankaŭ la nia.

Notoj de la tradukinto:

- °) bestoj, latine otaria
- °°) tiamaj fremdaj moneroj - retrovebla en PV.

BELETRA ALDONO DE STARTO+BELETRA ALDONO DE STARTO+BELET

Sekce mládeže Českého esperantského svazu byla založena v Brně 30. března 1969. Její organizační řád byl předsednictvem ÚV ČES schválen 23. dubna. Dnes je 22. června a Sekce prakticky ještě nemá členy. Proč, když SM ČSEV měla v českých zemích přes 800 členů?

Vysvětlení je kupodivu snadné. Podle stanov ČES může být členem Sekce pouze člen Svazu. Háček č. 1. Kluby nespíchají s odesíláním přihlášek svých členů, mezi nimiž jsou pochopitelně i mládežníci. Svaz nemá dosud místnosti a nevypadá to, že by je v nejbližší budoucnosti získal. Jeden člověk v provizorním sekretariátu Svazu nemůže všechno sám stačit. Háček č. 2. Sekce je momentálně také bez místnosti, takže pražští členové výboru musí chtě-nechtě brzdit svou pracovitost a shánět místnost, v které by mohli pokračovat v práci. Háček č. 3. Po potvrzení a sečtení to vypadá, že první členy bude Sekce mít až napodzim.

Pokud to tak opravdu nemá dopadnout, popohánějte své kluby nebo pošlete přihlášku a členský příspěvek přímo Svazu (pokud ve vašem nejbližším okolí není žádný esperantský klub). Členské příspěvky Svazu činí pro výdělečně činné 48,-- Kčs, pro nevýdělečně činné (studenti, vojáci apod.) pouhých 24,-- Kčs. To vše plus 10,-- Kčs na zápisné. Členství v Sekci je po zaplacení těchto příspěvků už naprosto bezplatné a pouze bloud by pohrdl nabízenými výhodami. Stačí jen vyplnit a odeslat na adresu Sekce přihlášku, kterou automaticky pošleme každému členu Svazu, který se dosud nepřehoupl přes hranici třiceti let.

To by snad bylo pro dnešek všechno. Hezky si užijte prázdniny, případně dovolenou a za dva měsíce na shledanou.

-P-

PŘIJEDTE DO LANČOVA!

I letos, stejně jako již po řadu let, je pořádán Letní esperantský tábor, který se pro mnoho esperantistů, hlavně mladých, stal pravidelným cílem. Ti, kteří sami prožili nějaký ten den v táborovém prostředí mi jistě řeknou pravdu, že to stálo za to. A těm mladým esperantistům, kteří touží po romantice, přátelství, zábavě, odpočinku, ale i studiu mezinárodního jazyka, a kteří dosud váhají, pak vřele doporučuji, aby se do Lančova určitě přijeli podívat a aby s námi prožili dva týdny v mládežnickém turnusu.

Dopolední vyučování probíhá ve skupinách dle jazykové vyspělosti a je o to zajímavější, že se odehrává volně v přírodě. Své znalosti všichni mohou uplatnit již odpoledne při konverzaci se zahraničními účastníky tábora, či při lovu zeleného bobříka. Po obědě bývá program buď individuální nebo společný. Někdo dá přednost koupání, jiný si zase na loďce vypluje trochu dál po Lančovské zátocce, někdo má rád volejbal a turisté se těší na výlety na zříceninu Cornštejn, na hrad Bitov nebo do Lednice. Věřte, že po tolika krásných a příjemných chvílích budete z tábora odjíždět s těžkým srdcem, a že se další rok vrátíte do Lančova zas.

Proto nemeškejte a co nejdřív odešlete své přihlášky, tábor začne co nevidět.

Jaroslav Adamec

A nám nezbyvá, než k dopisu několikanásobného účastníka SETu přidat jen několik nezbytných údajů. - Pro mládež od 12 do 30 let je rezervován druhý běh od 27. 7. do 9. 8. Celkový pobyt stojí Kčs 380,--; pro mládež do 15 let Kčs 350,--.

A kde se máte přihlásit? Pište na adresu: Klub esperantistů, Osvětový dům Bedřicha Václavka, T ř e b í č.

Jaromír Šavda

La Ŝtono

Tiu stranga ŝtono kuŝis sur neĝo, pro tio la homo devis rimarki ĝin. Revenante el posttagmeza labor-sekcio li kauretis en vintra surtuto, ĉar la hidrargo en la termometro falis profunde sub la ruĝan signon. La luno lumis, ĝia lumo obligis per reflektado vastetenda kaj ĉion brakumanta neĝa plataĵo, sur kiu la ŝtono estis la unu-sola nigra punkto.

Komence li piedfrapis ĝin. La ŝtono forsaltis de lia ski-boto, ne malproksimen, nur kelkajn metrojn, kaj denove kuŝis sur blanka vojo. La homo klinigis kaj prenis la ŝtonon en manon. Ĝi estis elradianta maldekstara varmon, varmigis la manplaton - sed estis seka; la neĝo ne fandiĝis sur ĝi.

La homo enpoŝigis la ŝtonon kaj tenis la manon sur ĝi. Varma, kiun ĝi produktis, estis agrabla: la fingroj estis malrapide liberigantaj el sia glacia frostrigideco.

Li alvenis hejmen. Tio signifas la ĉambron de vilaĝa kafejano, li loĝis ĉi tie sola. Ĝi jetis supraĵan rigardon sur la ŝtonon. Ĝi estis glata, ovalforma, preskaŭ simetria, ĝi lovis brile ruĝan koloron. Serpense li denove enpoŝigis ĝin en la surtuton.

Kiam matene eksonoris lia vekhorloĝo - ĝi estis malnovega, jam kelkfoje riparata mekanismo, staranta sur seĝo de ligno - li miris. Estis ankoraŭ mallume, kvankam forĝiste faritaj montriloj montris jam duonon post la oka. Denove ĝi kronigis, prefere forĵeti ĝin en rubejon, ekpensis li malborbore kaj dormeme prilumigis per elektra poŝlampeto sian brakhorloĝon. Ĝi montris la saman horon. Li ellitigis, ĝi treme kaj tremante de malvarmo falis sin.

Ĉar la aŭtobuso en la urbon forveturadis de la Kruco kvaronon post la naŭa, li devis pa-

NI NIA PROGRAM-DEKLARO NI PROKLAMIS, ke ...ni kunlaboros kun organizoj, defendantaj la homrajtojn kaj batalantaj kontraŭ la lingva diskriminacio, precipe kun Societo por la Homrajtoj... Sed baldaŭ post kiam ni forsendis leteron kun propono pri kunlaboro al SHR, la societo batalanta por homaj rajtoj estis en Ĝenio la 13-an de majo malpermesita laŭ la decido de Ministerio de Internaj Aferoj de Ĝenio. Mianigita per tio, ke "...ĝisnuna agado de Societo por Homrajtoj pruvas, ke ĝi funkcias pri organizo plenumanta funkcion de politika organizo, aktive aganta en Ĝenio kaj ĝiaj civitanoj...". Pro nesufico de spaco ni citos nur finon de la lasta letero de ĝiaj membroj.

"...Ĉiu el vi vivu tiel, ke li prenu eĉ ne ion da libero de aliuloj kaj liberu al ĉiuj deziru, ke li al neniu faru maljustaĵon kaj restu en ĉiuj cirkonstancoj homo.

Ni certas, ke vi en via vivo faros ĉion por efektiviĝi niajn fundamentajn principojn: senigi homojn de timo kaj ne esti flegma al sorto de aliulo.

Kaj ni ankaŭ certas, ke ne nur la vero, sed ankaŭ homeco en la tuta mondo venkos..."

pidi por kapti ĝin. Sed erari-
gis lin la mallumo, kiu ĝis nun
regis ĉie.

En la stacion li alkuris
prekcau senspire. Li denove ri-
gardis la horloĝon. Komencis
tagiĝi. Gi montris - surprize -
svoronon post la oka. Ĉu mi
frenezigiĝis, li demandis sin
memu. Nenio atestis pri baldaŭa
reveno de aŭtobuso. Eĉ vojaĝon-
toj, kiuj ordinare ĉe la Kruco
atendas, ne staris en la sta-
cio.

Estus pli bone iri hejmen,
tio estas ja absurde, ne povas
esti pli malfrue ol ĉirkau la
ropa, maksimume je duono pli.
Li denove rigardis la brakhor-
loĝon. Ĉiam ankoraŭ estis kva-
riono post la oka. Ĝi ĉesis
funkcii, venis al li la ideo.
Li metis ĝin al orelo, sed ĝi
funkciis.

La korpo en la vintra surtuto
estis malrapide malvarmiĝanta,
li eksentis froston. Li meĥani-
ke enpoŝigis la manojn kaj pal-
pe trovis la ŝtonon. Li ekĝo-
jigis, pensante, ke li varmigis
siajn manojn. Sed la ŝtono es-
tis tute malvarma.

Intertempe la lumo pliinten-
siĝis. Li elpoŝigis la ŝtonon
kaj jetis rigardon al ĝi. Li
trovis nenion okulfrapan. Ĝi
ŝajnis esti pli malgranda kaj

pli malpeza ol hieraŭ. Ordinara
hele griza ŝtono...

Estas strange, hieraŭ ĝi es-
tis ruĝa.

Kaj ĉu vi scias tion tute
certe? demandis lin ene lia dua
interna voĉo. Tiu dua voĉo na-
ŝatis misterojn kaj sorĉojn,
kaj ĉar ĝi en lia interno su-
perregis, li estis homo sobra
kaj tute normala, kion dirus la
psikiatroj.

La aŭtobuso venis post du ho-
roj. La pasaĝeroj estis eniran-
taj sen grumbloj: evidente ĉie
estis en ordo. La homo estis
frostrigida kaj grumblema, sed
hontis demandi aliulojn, kio
propre statas la afero.

Nur posttagmeze en la laboro
venis al li ideo, ke frenezigo
de la vek- kaj brak-horloĝoj
povus esti iel interligita kun
la ŝtono. Mi devas dumvoje hej-
men forĵeti ĝin, li promesis al
si.

Li trovis ĝin post la labor-
sekcio en poŝo de la surtuto
kaj meditante li longe turnadis
ĝin en la mano. Li ne forĵetis
ĝin. Li estis pensanta pri ĝi
jam tro longe. Mi devas solvi
la enigmon de tiu ĉi ŝtono,
postulis kategorie lia vana,
romantika interna voĉo.

Hejme li preparis pezan haki-

Tyresö. Tiu ĉi nomon vi tre versajne neniam antaŭe aŭdis. Sed certe vi aŭ-
dis la nomon de Stockholm. Jen, Tyresö estas ĝia moderna antaŭurbo. Kiel ĝi estas
por ni interesa? En la jaro 1969 ĝi fariĝas centro de la junulara E-movado de la
tuta mondo, ĉar ĝuste en ĝi okazos inter 3 - 10 de aŭgusto 1969, de dimanĉo ĝis
marto, tuj post la UK en Helsinki, la 25-a Internacia Junulara Kongreso de
1969. Kaj kotizoj? De 30 ĝis 39 usonaj dolaroj. Adreso: 25-a IJK, Myggdalsvägen
10, S-135 00 Tyresö, Svedio. BONAN VOJAĜON!

Ĉu vi volas ricevi preskribon por feliĉo? Do bonvolu skribi al Tensho Kotai Jin-
gu Kyo, Tabuse, Yamaguchi-ken, JAPANIO.

Mi petas pardonon de niaj eksterlandaj legantoj pro tio, ke tiu ĉi numero de JP
estas escepte certaparte nacilingva.

Pluan pardonon mi petas de komitatano de nia Sekcio s-ano Vladislav Hasala pro
mistajpo de liaj nomo kaj adreso. Ĝuste devas esti Vladislav Hasala, S. K. Neu-
manna 37, H o d o n i n.

lon. Li laboregis duonhoron, sed ne sukcesis forfendi de la ŝtono eĉ fragmenteton. Ĝi estis freneziga. Li ekhejtis kaj jetis la ŝtonon en fajron. Ĉasante ĝin post duonhoro de tie, li brulvundis siajn manojn de ardaĵ karbrekrementoĵ. Sed la ŝtono olivarmigis nur etete.

Sed mi ne frenezigos, mi ne, li ordonis al si. Li pakis la ŝtonon en skatolon, en letero plena de gramatikaj eraroj pri-ekribis siajn aventurojn, kaj sendis tion ĉion al esplor-instituto.

- - -

Estis jam malfrus somero, kiam juna scienca aspiranto, enuigita kaj lacega pro vermego, rememorigis pri sendaĵo, kiu antaŭ iom longa tempo, vintre, venis kun tiel stranga letero. Li tralegis ĝin ankoraŭfoje, pikanis kaj prenis la skatolon en la manon. La ŝtono estis en ĝi. Griza, malverma, tute malpelega. Li pesis ĝin kaj konstatis specifan pezon: nulo ko-

Kun plua rikano li rememoris, ke nekonatulo, sendinta ĝin ĉi tien, frapegis la ŝtonon per peza hakilo. Li premis la akon en pugno. Ĝi disŝprucis kiel malplena ovoŝelo.

La juna scienca aspiranto surpris per mikrometra ŝtango fragmenton de ŝelo, observita per mikroskopo kaj trovita sur la interne flanko de la ŝelo restis subtila, preskaŭ imperceptebla ŝpinajo, analoge al araneaĵo, sed absolute nelogika en sia ordo. Ĝi estis arkitektura pli bagatela ol la araneaĵo. Ĝi estis difektebla per nura spektaro.

La juna viro prenis la fragmentojn, skatolon kaj leteron kaj forjetis ĉion en paperkorbon. Senekscite li bruligis al si cigaredon. Ie en la angulo de lia menso estiĝis subita ideo, ke eble povus temi pri la ekstertera kreaĵo. Sed la juna aspiranto tuj forpelis tiun ideo. Li ja ne estis romantikulo, sed klerulo, kaj sciis pri la lernejo, ke probablecota vizito estas nur unu kontraŭ la deksepa potenco de la

el
Rakontoj el la Tria Tempo
tradukis -P-

HUMORO EN KRIZA TEMPO

Konsol-gruko

La temp' terura estas, ve!
Sed optimisto restas mi ĝisoste.
Konsolas min konstante, ke
pli bone estas nun ol iĝos poste.

Kumbel

Ĉu la enhavo de JP plaĉas al vi? Ne plaĉas? Do plibonigu ĝin! Verdire ni ne atendas, ke tiu ĉi alvoko havus ian rezulton. Estis ja jam multe da tiaj alvokoj... Sed vere vi neniam provis ion traduki aŭ eĉ verki? Ne forĵetu viajn verkaĵojn en paperkorbon, sed en poŝtkeston! Nian adreson bonvolu legi malsupre.

JUNULARAJ PAĜOJ - oficiala organo de Junulara Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio =
redaktas: la Komitato = Adreso: poŝtkesto 168, Praha 1,
Ĉ E Ĥ I O, ĈEĤOSLOVAKIO